ISBN 978 92 9017 122 5

INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO

66-a SESIO

Rejkjaviko, Islando
20-27 julio 2013

Amri Wandel kaj Roy McCoy (red.)

Universala Esperanto-Asocio

Unu komuna lingvo, multaj malsamaj kulturoj: problemoj de interkultura komunikado en Esperanto

Tsvi Sadan (Tsuguya Sasaki)

Israela lingvisto, kiu naskiĝis en Japanio en 1963, poste enmigris en Israelon kaj nacianiĝis tie. Li esperantistiĝis en 1986. Li doktoriĝis pri hebrea lingvistiko ĉe la Hebrea Universitato de Jerusalemo. Li estas postenrajta supera docento pri hebrea lingvistiko ĉe la Universitato Bar-Ilan en Israelo. Li interesiĝas pri moderna hebrea lingvistiko, jida lingvistiko, esperantologio, leksikologio, leksikografio, onomastiko, kontaktlingvistiko, socilingvistiko kaj interkultura komunikado. Dum multaj jaroj li (tra)vivas interkulturan komunikadon kaj ĝiajn problemojn, (super)vivante japanan, israelan kaj tradician judan kulturojn en la japana, la hebrea, la jida, la angla kaj Esperanto, kaj sentante sin perfekte hejme en neniu el ili.

Resumo

Kiam Zamenhof iniciatis Esperanton kiel internacian komunikilon inter diversaj lingvanoj, li verŝajne pensis precipe pri homoj, kiuj havis pli-malpli la saman eŭropan kulturon, kaj fakte tiel statis la afero en la unuaj periodoj de la lingvo. Sed ju pli Esperanto disvastiĝis kaj tutmondiĝis, des pli heterogena ĝia komunumo fariĝis kulture. Ni esperantistoj uzas Esperanton kiel nian komunan lingvan komunikilon, sed tio ne signifas, ke ni havas ankaŭ la saman kulturon de komunikado. Fakte, ŝajnas, ke multaj el ni komunikas pli-malpli laŭ la normoj de niaj respektivaj denaskaj kulturoj de komunikado, t.e. multaj el ni havas nacikulturan "akĉenton" kiam ni komunikas en Esperanto.

Partopreninte en du Universalaj Kongresoj, mi alvenis al firma konkludo, ke komuna lingvo sola ne estas sufiĉa por signifoplena komunikado preter la nivelo de supraĵa konversacio. Ideale oni devus havi ankaŭ komunan kulturon de komunikado en Esperanto. Tamen tio ne ŝajnas facile atingebla, kaj ankaŭ ŝajnas malfacile koni ĉiujn ĉefajn kulturojn en la mondo; do oni devas almenaŭ konscii, ke problemoj povas okazi inter ni esperantistoj, kiuj havas unu komunan lingvon sed malsamajn kulturojn de komunikado.

Por ilustri tiujn problemojn, mi kontrolos kaj komparos la tipajn strategiojn, kiujn japanoj kaj israelanoj uzas, en diversaj kampoj de (lingva) komunikado, kaj montros iliajn eblajn reagojn al la strategioj de la alikulturanoj. Mi elektis la japanan kaj israelan kulturojn por tiu ĉi komparo, ne nur ĉar mi (super)vivas kaj konas ilin tre bone, sed ankaŭ ĉar ili verŝajne reprezentas du kulturajn antipodojn, inter kiuj troviĝas multaj aliaj kulturoj en la mondo.

Mi demandos ankaŭ, ĉu ni povos atingi ne porokazan sed pli-malpli stabilan interkulturon, aŭ komunan kulturon, de komunikado en Esperanto, kaj se jes, en kiuj kampoj ĝi eblas, kaj kia ĝi estos.

Mi konkludos, ke ni esperantistoj devas konscii pli, ke paroli en Esperanto ne garantias neeston de kultura miskompreno, kaj kiam ni komunikas kun esperantistoj de aliaj kulturoj de komunikado, ni povas havi problemojn, kiuj povas konduki al miskomprenoj.

One common language, many different cultures: problems of intercultural communication in Esperanto

Summary

When Zamenhof initiated Esperanto as an international means of communication between speakers of different languages he was probably thinking mainly of people who shared more or less the same European culture, and that was in fact the situation during the first period of the language. But the more Esperanto spread and became globalised, the more heterogeneous its community became culturally. We Esperantists use Esperanto as our common means of communication, but that does not mean that we have the same culture of communication. In fact, many of us communicate more or less according to the standards of our own native cultures of communication, that is, many of us have a national-cultural "accent" when we communicate in Esperanto.

After taking part in two World Esperanto Congresses I came to the firm conclusion that a common language is not on its own sufficient for meaningful and interesting communication beyond the level of superficial conversation. Ideally one should also have a common culture of communication. However, that seems difficult to achieve, and it is hardly possible to know all the cultures in the world, so one must at least be aware that problems can arise between speakers of Esperanto, who have one common language but different cultures of communication.

To illustrate these problems, I will examine and compare the typical strategies used by Japanese and Israelis in various areas of (linguistic) communication and show their possible reactions to the strategies of members of other cultures. I have chosen Japanese and Israeli cultures for this comparison not only because I live/survive in them and know them well but also because they probably represent two cultural antipodes, between which many other cultures of the world are located.

I will also ask whether we can achieve not an ad hoc but a more or less stable "interculture", or common culture, of communication in Esperanto, and if so in what areas that can be done and what form it will take.

I will conclude that we Esperantists must be more aware that speaking in Esperanto does not guarantee there will be no cultural misunderstandings, and when we communicate with Esperantists from other cultures of communication we can experience problems that can lead to misunderstandings.

Une langue commune, beaucoup de cultures différentes: problèmes de la communication interculturelle en espéranto

Résumé

Quand Zamenhof a conçu l'espéranto comme outil de communication internationale entre personnes de langues différentes, sans doute pensait-il surtout à des personnes ayant plus ou moins la même culture européenne, et de fait c'est bien ce qu'il se passa dans les premiers temps de la langue. Mais plus l'espéranto se répandait à travers le monde, et plus sa communauté devenait culturellement hétérogène. Nous, les espérantistes, utilisons l'espéranto comme notre outil commun de communication linguistique, mais cela ne signifie pas que nous avons la même culture de communication. En fait, il semble que nombre d'entre nous communiquent plus ou moins selon les normes de nos cultures de communication natives respectives, autrement dit beaucoup d'entre nous ont un "accent" culturel national quand nous communiquons en espéranto.

Ayant participé à deux Congrès Universels, je suis parvenu à la ferme conclusion qu'une langue commune seule ne suffit pas à une communication pleine de sens au-delà du niveau d'une conversation superficielle. Dans l'idéal on devrait aussi avoir une culture commune de communication en espéranto. Cependant, cela ne semble pas facilement réalisable, et il semble également difficile de connaître toutes les principales cultures du monde, donc on doit au moins prendre conscience des problèmes qui peuvent survenir entre nous espérantistes, qui avons une langue commune mais des cultures de communication différentes.

Pour illustrer ces problèmes, j'observerai et comparerai les stratégies typiques qu'utilisent les Japonais et les Israéliens dans divers domaines de communication (linguistique), et je montrerai leurs possibles réactions aux stratégies des personnes de culture différente. J'ai choisi les cultures japonaise et israélienne pour cette comparaison, pas seulement parce que j'y (sur)vis et que je les connais très bien, mais aussi parce qu'elles représentent sans doute deux antipodes culturels, entre lesquels se situent beaucoup d'autres cultures dans le monde.

Je poserai aussi la question de savoir si l'on peut parvenir à une interculture, ou culture commune, de communication en espéranto qui soit non pas occasionnelle mais plus ou moins stable, et dans l'affirmative, dans quels domaines elle serait possible, et quelle forme elle aurait.

Je conclurai que nous autres espérantistes devons être plus conscients que le fait de parler en espéranto ne garantit pas l'absence d'incompréhension culturelle, et que lorsque nous communiquons avec des espérantistes ayant d'autres cultures de communication, nous risquons de rencontrer des problèmes qui peuvent engendrer des incompréhensions.

Eitt sameiginlegt tungumál, margir ólíkir menningarheimar: vandamál í menningarsamskiptum á esperanto

Útdráttur

Þegar Zamenhof kynnti esperanto sem alþjóðlegan samskiptamiðil fólks með ólíkar þjóðtungur hugsaði hann líklega einkum um fólk, sem hafði að meira eða minna leyti sameiginlega evrópska menningu, og í raun háttaði þannig til í árdaga tungumálsins. En því meira sem esperanto breiddist út og varð alheimsmál, þeim mun misleitara varð samfélag þess menningarlega. Við esperantistar notum esperanto sem sameiginlegan tungumálamiðil okkar, en það merkir ekki, að við höfum einnig sömu samskiptavenjur. Í raun virðist sem mörg okkar hafi samskipti að meira eða minna leyti samkvæmt eigin viðmiðum hverra um sig, samskiptavenjum sem við fæðumst inn í, þ.e.a.s. mörg okkar viðhafa þjóðmenningarlega "áherslu" þegar við tjáum okkur á esperanto.

Eftir að hafa tekið þátt í tveimur heimsþingum komst ég að fastri niðurstöðu um að sameiginlegt tungumál eitt sér nægir ekki fyrir merkingarfull samskipti á hærra stigi en í yfirborðslegum samræðum. Helst ættu menn einnig að hafa sameiginlegar samskiptavenjur á esperanto. En því virðist ekki vera auðveldlega komið í kring, og einnig virðist vera erfitt að þekkja allar helstu samskiptavenjur í heiminum, þess vegna ber manni að minnsta kosti að átta sig á að vandamál geta komið upp meðal okkar esperantista sem höfum samskipti á einu sameiginlegu tungumáli en höfum ólíkar samskiptavenjur.

Til þess að varpa ljósi á þessi vandamál ætla ég að athuga og bera saman þær venjur sem japanir og ísraelar hafa á ýmsum sviðum mállegra samskipta og sýna hugsanleg viðbrögð þeirra við umgengnisháttum fólks með aðra menningu. Ég hef valið japanska og ísraelska menningarheima fyrir þennan samanburð, ekki aðeins af því að ég lifi þá af og þekki þá mjög vel, heldur einnig af því að þeir standa líklega fyrir tvö ólík menningarsvæði, og á milli þeirra finnast margir aðrir menningarheimar.

Ég spyr einnig hvort við munum geta öðlast meira eða minna traustar samskiptavenjur, eða sameiginlegar samskiptavenjur, á esperanto, og sé svo á hvaða sviðum þær séu mögulegar og hvernig þær eigi að vera.

Ég álykta að við esperantistar eigum að gera okkur betur ljóst, að það að tala á esperanto tryggir okkur ekki gegn menningartengdum misskilningi, og þegar við höfum samskipti við esperantista með aðrar samskiptavenjur geta komið upp vandamál sem geta leitt til misskilnings.

Unu komuna lingvo, multaj malsamaj kulturoj: problemoj de interkultura komunikado en Esperanto

1 Enkonduko

1.1 Radikoj de problemoj de interkultura komunikado en Esperanto

Ŝajnas, ke sufiĉe multaj esperantistoj ankoraŭ kredas naive kaj eĉ propagandadas al la ekstera mondo, ke Esperanto estas ideala interkultura lingva komunikilo, ĉar ĝi estas gramatike regula kaj simpla, leksike produktiva, kaj lingve kaj kulture neŭtrala. Sed mi jam travivis en du Universalaj Kongresoj, ke komuna lingvo sola, eĉ se ĝi estas neŭtrala, ne sufiĉas por senproblema interkultura komunikado. Lingvo estas pli ol gramatiko kaj leksiko, kaj komunikado estas pli ol lingvo.

Estas vere, ke lingvo estas unu el la plej gravaj komponantoj de komunikado, kaj oni povas lerni la gramatikon kaj leksikon de Esperanto multe pli facile kaj rapide ol tiujn de etnaj lingvoj. Kaj estas vere, ke ankaŭ kiam homoj de diversaj kulturaj fonoj komunikas en internaciaj etnaj lingvoj, ili povas havi problemojn de interkultura komunikado. Tamen kiam ili komunikas en Esperanto, la problemoj povas esti pli akraj ĝuste pro ĝia kultura neŭtraleco, kiu ne favoras unu komunan kulturon de internacia lingva komunikado.

Eble Zamenhof mem ne pensis pri problemoj de interkultura komunikado en Esperanto, ĉar verŝajne li estis tro okupita pri problemoj de la lingvo mem, kaj la unuaj esperantistoj havis pli-malpli la saman eŭropan kulturon. Sed ekde tiam Esperanto kaj ĝia komunumo disvastiĝis en multaj landoj tra la mondo. La Esperanto-komunumo tutmondiĝis kaj Esperanto fariĝis diaspora lingvo, tiel ke esperantististoj ne plu estas kulture homogenaj; eble nia unusola komuna lingva trajto estas, ke ni uzas tiun ĉi kulture neŭtralan lingvon.

Esperanto estas kulture neŭtrala en tio, ke ĝi ne devigas siajn uzantojn sekvi iun ajn kulturan normon de komunikado, simple ĉar tia normo aŭ ankoraŭ ne ekzistas aŭ ankoraŭ ne stabiliĝis, kvankam ĝi povas naskiĝi aŭ stabiliĝi kiel rezulto de interkonsento de la komunumo. Do intertempe multaj homoj uzas Esperanton laŭ la normoj de siaj respektivaj kulturoj, t.e. kun la "akĉento" de sia respektiva kulturo, ofte nekonscie, kaj eĉ kredante naive, ke ĉar ili uzas neŭtralan lingvon kiel interkulturan lingvan komunikilon, ĉio, kion ili esprimas, devas esti perfekte komprenata ankaŭ de homoj de aliaj kulturoj. Kaj tio kondukas al diversaj problemoj de interkultura komunikado en Esperanto, pri kiuj ne ĉiuj esperantistoj konscias.

1.2 Celoj de tiuj ĉi esploreto

Tial tiu ĉi prova esploreto celas antaŭ ĉio konsciigi esperantistojn (kiuj pensis alie ĝis nun), ke komuna lingvo sola ne garantias signifoplenan interkulturan komunikadon sen miskompreno se la komunikado estas pli ol supraĵa konversacio, ekzemple pri la vetero.

Por atingi tiun ĉi ĉefan celon, mi unue klarigos, kiuj kampoj de lingva kaj nelingva komunikado povas esti problemaj en interkultura komunikado ĝenerale, kaj kio karakterizas Esperanto-komunumon kaj interkulturan komunikadon en Esperanto. Poste mi kontrolos kaj komparos la tipajn strategiojn, kiujn japanoj kaj israelanoj uzas, en diversaj kampoj de komunikado, kaj montros iliajn eblajn reagojn al la strategioj de la alikulturanoj. En tiu ĉi esploreto mi devas limigi min al lingva komunikado, lasante nelingvan komunikadon por alia fojo kaj/aŭ por pli kapablaj fakuloj ol mi.

Mi demandos ankaŭ, ĉu ni povos atingi ne porokazan sed pli-malpli stabilan interkulturon, aŭ komunan kulturon, de lingva komunikado en Esperanto, kaj se jes, en kiuj kampoj ĝi eblas, kaj kia ĝi estos.

Mi esperas, ke ne estas tabue diskuti publike pri ekzistantaj problemoj de interkultura komunikado en Esperanto, kaj pli kapablaj fakuloj ol mi povos priskribi kaj analizi ilin pli detale kaj pli profunde surbaze de empiriaj donitaĵoj. Fakte, ĉiu kampo de interkultura komunikado en Esperanto meritas apartan esploron.

1.3 Kiel ilustri problemojn de interkultura komunikado en Esperanto

Por ilustri problemojn de interkultura (lingva) komunikado en Esperanto, mi elektis la japanan kaj israelan kulturojn, ne nur ĉar mi (super)vivas kaj konas ilin tre bone, sed ankaŭ ĉar ili verŝajne reprezentas du kulturajn antipodojn, inter kiuj troviĝas multaj aliaj kulturoj en la mondo. Estas vere, ke en ĉiu kulturo ekzistas intrakulturaj variaĵoj, sed ili estas kvantaj diferencoj kaj ne kvalitaj diferencoj, kiuj karakterizas interkulturajn variaĵojn.

Por simpligi la komparon mi devis limigi min al vizaĝ'-al-vizaĝa buŝa komunikado inter unu japana kaj unu israela esperantistoj. Ideale, mi devus observi tian komunikadon, kiel ĝi okazas en aŭtentikaj situacioj. Sed pro teknikaj obstakloj kaj ankaŭ pro la simpla fakto, ke tia komunikado estas malofta, mi devis rezigni tiun ĉi metodon kolekti donitaĵojn. Mi devis rezigni ankaŭ pri la metodo peti japanajn kaj israelajn esperantistojn plenigi enketon, kiun mi preparis, simple ĉar mi ne povis trovi sufiĉe multajn homojn, kiuj estis pretaj partopreni en ĝi.

Kvankam mi plene konscias, ke estas metodologia problemo, mi devis, sen alternativo, preni israelajn strategiojn de lingva komunikado, aŭ pli precipe, de parolagoj, pri kiuj mi klarigos poste, de Brosh & Weinbach (1986). La ceteraj aferoj, t.e. tipaj japanaj kaj israelaj strategioj en la aliaj kampoj de lingva komunikado kaj eblaj reagoj al la israelaj kaj japanaj strategioj, estas laŭ mia introspekto. Mi preferis ne inventi ekzemplojn de tiuj strategioj laŭ mia introspekto en la formo de plenaj dialogoj. Mi esperas, ke eĉ tia skeleta ilustrado sufiĉos por konvinki vin, ke kiam homoj de malsamaj kulturaj fonoj komunikas en Esperanto, ja estiĝas problemoj, kelkaj el kiuj estas severaj kaj ofte eĉ nesolveblaj.

2 Interkultura komunikado

2.1 Ĝeneralaj rimarkoj

Estas konate, ke kiam du homoj, kiuj havas du malsamajn lingvojn kaj kulturojn, komunikas en tria lingvo, ili ofte alproksimiĝas unu al la alia kulture, kaj kreiĝas porokaze la tiel nomata interkulturo[1] en kiu la du kulturoj de la du kunparolantoj konverĝas. La inversa ekstremo estas, ke ĉiu el la du homoj parolas laŭ sia kulturo. Inter tiuj ĉi du antipodoj estas diversaj gradoj de kulturaj kompromisoj. Unu povas paroli laŭ sia kulturo, dum la alia parolas laŭ la kulturo de sia kunparolando aŭ kiel li komprenis ĝin senerare aŭ kiel li miskomprenis ĝin. Ĉiu el la du homoj povas paroli laŭ la kulturo de sia kunparolanto aŭ kiel li komprenis ĝin ĝuste aŭ kiel li miskomprenis ĝin. La jena tabelo montras tiujn kvar gradojn kaj iliajn subgradojn de interkultura konverĝo:

[1] Vidu, ekzemple, Kecskes (2012) pri la superrigardo de la koncepto.

Tipo	Parolanto 1	Parolanto 2
1	parolas laŭ sia kulturo	parolas laŭ sia kulturo
2.1.1	parolas laŭ sia kulturo	parolas laŭ la kulturo de sia kun-parolanto kiel li miskomprenis ĝin
2.1.2	parolas laŭ la kulturo de sia kun-parolanto kiel li miskomprenis ĝin	parolas laŭ sia kulturo
2.2.1	parolas laŭ sia kulturo	parolas laŭ kulturo de sia kun-parolanto
2.2.2	parolas laŭ la kulturo de sia kun-parolanto	parolas laŭ sia kulturo
3.1	parolas laŭ la kulturo de sia kun-parolanto kiel li miskomprenis ĝin	parolas laŭ la kulturo de sia kun-parolanto kiel li miskomprenis ĝin
3.2.1	parolas laŭ la kulturo de sia kun-parolanto	parolas laŭ la kulturo de sia kun-parolanto kiel li miskomprenis ĝin
3.2.2	parolas laŭ la kulturo de sia kun-parolanto kiel li miskomprenis ĝin	parolas laŭ la kulturo de sia kun-parolanto
3.3	parolas laŭ la kulturo de sia kun-parolanto	parolas laŭ la kulturo de sia kun-parolanto
4	parolas laŭ iu interkulturo	parolas laŭ iu interkulturo

Problema estas la fakto, ke oni ne povas antaŭscii pri sia kunparolanto, en kiu grado de interkultura konverĝo tiu parolas. Kaj ankaŭ problema estas la fakto, ke kaj vi kaj via kunparolanto parolas en malsamaj gradoj de interkultura konverĝo, depende de kampoj de komunikado.

2.2 Problemaj kampoj de interkultura komunikado

Inter la ĉefaj problemaj kampoj de interkultura lingva komunikado estas:

- Parolagoj (*speech acts* angle)[2]; inter la gravaj parolagoj estas:
  - Pardonpetado
  - Petado
  - Rifuzado
  - Plendado
  - Esprimado de opinio
- Alparolformoj (*address forms* angle): kiel oni alparolas sian kunparolanton, ĉu per lia persona nomo, per lia familia nomo, per liaj titolo kaj familia nomo, per lia titolo ktp[3]
- Vico-alternado (*turn-taking* angle): kiam kaj kiel oni donas sian vicon de parolado al sia kunparolanto kaj/aŭ prenas ĝin de li[4]

[2] Vidu, ekzemple, Wierzwicka (2003) pri detalaj transkulturaj priskribo kaj analizo de parolagoj en diversaj kulturoj.

[3] Vidu, ekzemple, Fasold (1990) pri translingva superrigardo de alparolformoj.

[4] Vidu, ekzemple, Tannen (2012) pri ĝenerala pritrakto de vico-alternado en interkultura komunikado.

Problemaj kampoj de interkultura nelingva komunikado[5], kiujn mi ne povas pritrakti en tiu ĉi prova esploreto, estas la jenaj:

- Silentado: kiam oni silentas kiel respondo, kaj pri kio oni ne parolas ktp[6]
- Vizaĝesprimoj: kiel oni esprimas vizaĝe la sentojn de ĝojo, surprizo, kolero, malestimo, naŭzo, malĝojo, timo ktp
- Fiksrigardo: kiom ofte kaj kiom longe oni fiksrigardas la okulojn de sia kunparolanto
- Gesto: kiujn korpopartojn oni movas; kiel oni movas ilin; kion signifas la koncerna gesto
- Kapjeso: kiom ofte kaj kiom rapide oni kapjesas
- Tuŝo: kiujn korpopartojn de sia kunparolanto oni tuŝas; kiel oni tuŝas ilin
- Persona spaco: kiom da fizika distanco oni lasas inter si kaj sia kunparolanto.

3 Karakterizaĵoj de la Esperanto-komunumo kaj interkultura komunikado en Esperanto

Woods (1979) karakterizas la Esperanto-komunumon kiel libervolan, neetnan kaj neteritorian lingvokomunumon. Eble ĝi estas la unusola lingvokomunumo, kiu havas tiujn ĉi tri karakterizaĵojn. La lingvokomunumo plej proksima al la Esperanto-komunumo ŝajnas esti la nuna jida komunumo, kiu estas kaj (parte) libervola kaj (parte) neteritoria sed ne neetna. Eĉ la komunumoj de mondlingvoj, kiel ekzemple la angla, restas etnaj en siaj kernaj teritoroj; nur en siaj periferiaj teritorioj ili ĉesis esti pure etnaj, kaj ili kompreneble restas nelibervolaj kaj teritoriaj. Multaj aliaj lingvokomunumoj estas nelibervolaj, etnaj kaj teritoriaj, t.e. ili estas la inversoj de Esperanto-komunumo.

Se ni komparas la Esperanto-komunumon kun aliaj lingvokomunumoj, ŝajnas, ke ĝia plej grava karakterizaĵo kiel interkultura komunikilo estas ĝia neetneco, kiu kondukas al manko de unusola kulturo de komunikado. Do temas pri *inter*kultura komunikado en *unu komuna* lingvo. Inverse, aŝkenazaj judoj, ekzemple, nun parolas diversajn lingvojn krom la jidan, inkluzive de la hebrea, la angla, la rusa, la germana, la franca, la hispana ktp, sed ili havas pli-malpli la saman kulturon de komunikado. Do temas pri *intra*kultura komunikado en *pluraj malsamaj* lingvoj. Travivinte kaj la interkulturan komunikadon de esperantistoj en unu komuna lingvo kaj la intrakulturan komunikadon de aŝkenazaj judoj en pluraj malsamaj lingvoj kaj komparante ilin, mi eĉ emas diri, ke la unua havas pli da problemoj de komunikado ol la dua. Fiedler (2002) estas inter la malmultaj esploroj, kiuj mencias eksplicite, ke ekzistas tiaj problemoj en la Esperanto-komunumo.

4 Kio povas okazi kiam japana kaj israela esperantistoj komunikas lingve

4.1 Ĝeneralaj rimarkoj

Ne estus facile trovi alian paron da kulturoj de komunikado tra la mondo kiel la japanan kaj israelan kulturojn de komunikado.[7] Ili diferenciĝas unu de la alia, interalie, laŭ la jenaj tri parametroj: 1) rekteco; 2) dependeco de la aĝo kaj socia rango de la kunparolantoj;

[5] Vidu, ekzemple, Matsumoto & Hwang (2012) pri ĝenerala pritrakto de nelingva komunikado en interkultura komunikado.

[6] Vidu, ekzemple, Nakane (2012) pri ĝenerala pritrakto de silentado en interkultura komunikado.

[7] Vidu, ekzemple, Takeuchi (1995) kaj Katriel (1986) pri ĝeneralaj karateraĵoj de japana kaj israela komunikado respektive.

3) dependeco de sociaj kuntekstoj. Ĝenerale, la japana kulturo de komunikado estas nerekta kaj dependas de la aĝo kaj socia rango de la kunparolantoj kaj sociaj kuntekstoj, dum israela kulturo de komunikado estas rekta (escepte kiam oni komunikas ironie) kaj ne tiel dependas de tiuj sociaj faktoroj.

Alia grava diferenco inter la du kulturoj de komunikado estas, ke multaj japanoj, inkluzive de esperantistoj, emas ŝanĝi siajn strategiojn kiam ili komunikas kun alikulturanoj (eble escepte de tiuj el Ĉinio kaj Koreio), dum malmultaj israelanoj emas ŝanĝi siajn strategiojn laŭ la sameco aŭ malsameco de la kulturo de sia kunparolanto. Tamen tiu ĉi ŝanĝo ĝenerale ne aplikiĝas al la supremenciita tria parametro; t.e. multaj japanoj ne povas senti sin komfortaj ĝis ili sukcesas diveni kaj trovi la proksimajn aĝon kaj socian rangon de sia kunparolanto.

En la jena ilustrado de kulturaj diferencoj kaj eblajn konfliktoj, japanaj kaj israelaj esperantistoj parolas en Esperanto, ne ŝanĝante siajn strategiojn de komunikado ankaŭ en Esperanto, kaj scias nenion pri la kulturo de komunikado unu de la alia. Tio estas por reliefigi la potencajn kulturajn problemojn kiam estas neniu interkultura konverĝo en komunikado. En ĉiu pritraktota kampo de komunikado mi montros unue tipajn israelajn kaj japanajn strategiojn, poste eblajn japanajn kaj israelajn reagojn al ili, kaj fine eblajn konfliktojn, kiuj povas okazi en vizaĝ-al-vizaĝa komunikado inter japano kaj israelano. Bedaŭrinde, mi devos pritrakti ĉiun probleman kampon de lingva komunikado tre mallonge kaj iom supraĵe, kaj mi ne povos montri ekzemplojn de la tipaj strategioj pro teknikaj kialoj.

4.2 Pardonpetado

Israelano tipe pardonpetas en unu el la jenaj manieroj: 1) pardonpeti sincere, kio ne ŝajnas tiel ofta; 2) pravigi sin; 3) nei sian respondecon; 4) kulpigi sian kunparolandon aŭ iun alian. Japano, aliflanke, tipe pardonpetas en unu el la jenaj manieroj: 1) pardonpeti sincere, kio ankaŭ ne ŝajnas tiel ofta; 2) pardonpeti formule; 3) kulpigi sin (eĉ kiam li mem ne estas respondeca), ofte atendante, ke lia kunparolando neos tion kaj kulpigos sin anstataŭe.

La japano povas pensi pri la dua, tria kaj kvara israelaj strategioj jene: Kial li entute ne pardonpetas? Li, mia israela kunparolanto, estas senrespondeca kaj nesincera pri tio, kion li diris aŭ faris. La israelano, aliflanke, povas pensi pri la dua japana strategio jene: Kial li, mia japana kunparolanto, entute ne pardonpetas? Pri la tria strategio li povas pense jene: Kial li devas kulpigi sin kiam li mem ne estas respondeca?

Oni povas vidi, ke la israela kaj japana kulturoj konfliktas en la jenaj du punktoj: kiel pardonpeti (formule aŭ ne); kiun kulpigi (sin aŭ iun alian).

4.3 Petado

Israelano tipe petas en unu el la jenaj manieroj: 1) peti rekte; 2) aludi; 3) sugesti; 4) peti retorike; 5) minaci. Japano, aliflanke, tipe petas en unu el la jenaj manieroj: 1) peti rekte, kio ne estas tiel ofta; 2) aludi, sed pli subtile ol israelano; 3) sugesti, sed denove pli subtile ol israelano.

La japano povas pensi pri la unua kaj kvina israelaj strategioj jene: Li estas tro rekta kaj agresema; li ne scias kiel peti. La israelano, aliflanke, povas pensi pri la dua kaj tria japanaj strategioj jene (retrospektive): Mi ne sciis, ke li petis min fari ion.

Oni povas vidi, ke la israela kaj japana kulturoj konfliktas jene: kaj la japano kaj la israelano malsukcesas kompreni tion, kion la alia petis, sed pro du kontraŭaj kialoj.

4.4 Rifuzado

Israelano tipe rifuzas en unu el la jenaj manieroj: 1) rifuzi rekte; 2) simple ignori, kio estas tre ofta; 3) inventi pretekston. Japano tipe rifuzas en unu el la jenaj manieroj: 1) rifuzi rekte, kio estas tre malofta; 2) rifuzi ĝentile sed insolente (!), kio estas tre ofta; 3) peti tempon por pripensi, kio estas tre ofta; 4) inventi pretekston.

La japano povas pensi pri la unua kaj dua israelaj strategio jene: Li estas neĝentila kaj nesentema. La israelano, aliflanke, povas pensi pri la dua japana strategio jene: Li estas hipokrita. Pri la tria strategio li povas pensi jene (retrospektive): Mi ne sciis, ke li rifuzis.

Oni povas vidi, ke la israela kaj japana kulturoj konfliktas jene: Israelano eble povas komprenigi japanon, ke li rifuzas, sed povas impresi lin negative pri sia parolago; dum japano eble ne ĉiam povas komprenigi israelanon, ke li rifuzas, sed eĉ kiam li sukcesas, ankaŭ li povas impresi lin negative pri sia parolago.

4.5 Plendado

Israelano tipe plendas en unu el la jenaj manieroj: 1) plendi rekte, kio estas tre ofta; 2) plende nerekte tra iu influa homo. Japano, aliflanke, tipe grumblas en unu el la jenaj manieroj: 1) plendi rekte, sed nur al iu, kiu por li havas pli malaltan socian rangon; 2) plendi nerekte tra iu influa homo, kio estas preskaŭ tabua; 3) plendi pri la koncerna homo al aliuloj; 4) kalumni la koncernan homon anonime; 5) vundi la koncernan homon fizike aŭ surloke aŭ embuske, kio estas tre ekstrema sed ne malofta.

La japano povas pensi pri la unua israela strategio jene: Li plendas tro ofte kaj pri tro multaj aferoj. Pri la dua strategio li povas pensi: Li malobservis tabuon, do li ne estas pardonebla. La israelano, aliflanke, povas pensi pri la unua japana strategio jene: Kial li ne povas plendi rekte al ĉiu egale? Pri la tria, kvara kaj kvina strategioj li povas pensi jene: Li estas mense malsana.

Oni povas vidi, ke la israela kaj japana kulturoj konfliktas jene: Certaj israelaj kaj japanaj strategioj de plendado ŝajnas preskaŭ ekzkluzivi unu la alian, tiel ke eble estas neeble plendi, ne estante miskomprenita de la alia kaj/aŭ stimuli tre negativan reagon de la alia.

4.6 Esprimado de opinio

Israelano tipe esprimas opinion en unu el la jenaj manieroj: 1) esprimi opinion rekte, senkonsidere al tio, kiu estas lia kunparolanto, kio estas tre ofta. Japano, aliflanke, tipe esprimas sian opinion en unu el la jenaj manieroj: 1) esprimi opinion rekte, kio estas tre malofta, aparte kiam li parolas kun iu, kiu havas pli altan socian rangon ol li, kaj se li ne estas ebria; 2) prezenti sian personan opinion kvazaŭ ĝi estus komuna saĝo, kio estas tre ofta; 3) subpremi sian opinion kaj silenti, kio ankaŭ estas tre ofta.

La japano povas pensi pri la israela strategio jene: Kial li ne povas konsideri pli, kun kiu li parolas? Mi deziras, ke ankaŭ mi povus esprimi mian opinion tiel rekte al ĉiu. La israelano, aliflanke, povas pensi pri la dua kaj tria japanaj strategioj jene: Ĉu li ne havas sian propran opinion? Pri kio li timas?

Oni povas vidi, ke la israela kaj japana kulturoj konfliktas jene: Israelano esprimas opinion unudirekte kaj profitas de sia asertemo, dum japano suferas de sia memdevigata silentado.

4.7 Alparolformoj

Israelano tipe alparolas sian kunparolanton en unu el la jenaj manieroj: 1) per lia persona nomo (normo) eĉ kiam tiu havas pli altan socian rangon se la kunteksto estas neformala;

2) per liaj titolo kaj familia nomo, kiam li havas multe pli altan socian rangon kaj la kunteksto estas formala. Japano, aliflanke, tipe alparolas sian kunparolanton en unu el la jenaj manieroj: 1) per liaj titolo, inkluzive de "s-ro" aŭ "s-ino" kaj familia nomo (normo); 2) per lia persona nomo nur kiam li estas bona amiko (sed ne ĉiam); 3) nur per lia titolo kiam li havas pli altan socian rangon.

La japano povas senti sin nekomforta alparolante sian kunparolanton aŭ estante alparolata de li laŭ la norma israela strategio, ĉar ĝi ŝajnas tro intima. Ankaŭ la israelano povas senti sin nekomforta alparolante sian kunparolanton aŭ estante alparolata de li laŭ la norma japana strategio, sed pro la inversa kialo – ĝi ŝajnas tro formala.

En tiu ĉi kampo de interkultura lingva komunikado oni povas ofte observi diversajn gradojn de konverĝo aŭ kompromiso por eviti konflikton, kiu kaŭzas preskaŭ intuan nekomfortecon kaj al la japana kaj al la israelano. Sed ili ambaŭ povas misapliki la norman strategion de la alia kulturo: japano povas erare alparoli iun israelanon per lia persona nomo, kiun eĉ israelanoj ne aŭdacus alparoli tiel, kaj israelano povas erare alparoli iun japanon per liaj titolo kaj familia nomo, kiun eĉ japanoj ne aŭdacus alparoli tiel.

Ili ambaŭ povas konfuziĝi ankaŭ pro tute alia kialo: ili ne certas pri la konsisto de la nomo unua de sia kunparolanto, t.e. ili ne certas kiu estas lia persona nomo kaj kiu estas lia familia nomo. Do ĉiu el ili povas erare uzi la personan aŭ familian nomon de sia kunparolanto kiam li intencis alparoli lin per lia familia aŭ persona nomo respektive.

4.8 Vico-alternado

Kiam du israelanoj parolas, la paŭzo inter la fino de la parolo de unu kaj la komenco de la parolo de la alia estas sufiĉe mallonga, kaj ofte ĝi povas esti nula aŭ eĉ minusa, t.e. la dua komencas paroli antaŭ ol la unua finas sian parolon, speciale kiam ilia diskuto varmiĝas, kaj tia kruciĝo de du paroloj ne necese estas konsiderata kiel ofendo; por iuj ĝi povas esti komplimento, ke ilia parolo estas tiel interesa, ke la alia ne povas atendi ĝis ili finas paroli. Aliflanke, kiam du japanoj parolas, la interparola paŭzo estas multe pli longa. Komenci paroli antaŭ ol via kunparolanto finis sian parolon, estas konsiderata kiel ofendo al li.

Se israelano kaj japano parolas, paŭzante laŭ siaj respektivaj kutimoj, ili ambaŭ povas ofendiĝi, sed pro tute inversaj kialoj. La japano povas ofendiĝi ĉar la israelano komencis paroli, ne atendante la finon de lia parolo, kaj la israelano povas ofendiĝi ĉar la japano paŭzis tiel longe.

5 Al interkulturo de lingva komunikado en Esperanto

Eble eĉ tiu ĉi mallonga kaj iom supraĵa komparo de la japana kaj israela kulturoj de lingva komunikado sufiĉas por konvinki vin, ke unu komuna lingvo sola ne povas garantii senprobleman interkulturan komunikadon, ironie ĝuste kiam tiu komuna lingvo estas la kulture neŭtrala lingvo Esperanto.

Ĉar ni ne povas anticipi, ke ĉiu esperantisto konatiĝu kun ĉiuj ĉefaj kulturoj de komunikado en la mondo, komunume interkonsentita normigo de interkulturo de komunikado en Esperanto ŝajnas la unusola solvo. Sed ĉu tio eblas, aŭ ĉu la tiel nomata interkultura komunika kompetenteco[8] povas esti dezirinda (aŭ eĉ nepra) trajto de ĉiu esperantisto, kiu komunikas kun alikultura samideano?

[8] Vidu, ekzemple, Byram (2012) pri la koncepto.

Inter la sep kampoj de lingva komunikado, kiuj estis ilustritaj supre, nur la lastaj du, t.e. alparolformoj kaj vico-alternado, ŝajnas havi ŝancon de iu komunume interkonsentita normigo. Sed la aliaj kvin kampoj, t.e. parolagoj, estas tiel proksime ligataj kun la kulturoj de la parolantoj, ke eĉ la Esperanto-komunumo ne povus alveni eĉ al modesta normiga interkonsento. Bedaŭrinde, mi mem ne povas proponi solvon por tiuj problemoj de interkultura lingva komunikado en Esperanto, kiujn mi provis ilustri, kaj mi dubas, ĉu iu alia povos solvi ilin. Oni ofte diras, ke ni esperantistoj jam havas komunan kulturon, tamen certe ne de lingva komunikado sed en iu alia senco de la vorto.

6 Konkludo

En tiu ĉi esploreto mi provis montri, ke unu komuna lingvo sola ne sufiĉas por interkultura lingva komunikado sen problemoj, inkluzive de miskomprenoj kaj konfliktoj – ironie ĝuste kiam tiu komuna lingvo estas la kulture neŭtrala lingvo Esperanto, ĉar ĉiu povas uzi, aŭ konscie aŭ nekonscie, sian kulturon de komunikado kiam li parolas en Esperanto kun alikulturaj samideanoj.

Mi provis ilustri, kvankam mallonge kaj iom supraĵe, malsamajn strategiojn, kiujn japanoj kaj israelanoj povas uzi ankaŭ kiam ili parolas kun alikulturanoj en Esperanto ekzakte kiel kiam ili parolas kun samkulturanoj en siaj respektivaj denaskaj lingvoj, kaj ankaŭ miskomprenojn kaj konfliktojn, kiujn tiuj malsamaj strategioj povas kaŭzi inter japana kaj israela esperantistoj.

Eble en la kampoj de alparolformoj kaj vico-alternado ni povos alveni al iu komunume interkonsentita interkulturo, sed en la kampo de diversaj parolagoj tia interkultura konverĝo ŝajnas neebla. Sed aliflanke ni ne povos konatiĝi kun ĉiuj ĉefaj kulturoj de lingva komunikado en la mondo.

Do kion ni povas fari intertempe ĝis naskiĝos aŭ stabiliĝos iu interkulturo de komunikado en la Esperanto-komunumo iam en la estonteco? Ne ŝajnas esti solvo por problemoj de interkultura komunikado en Esperanto, aparte ĉar nia Esperanto-komunimo disvastiĝis en tiel multaj lokoj, kiuj havas malsamajn kulturojn de komunikado. Eble unu el la malmultaj aferoj, kiujn ni povas fari kiam ni komunikas kun alikulturanoj en Esperanto, estas konscii pri eblaj problemoj kaj havi interkulturajn toleron kaj imunecon.

Bibliografio

Brosh, S. & Weinbach, L. 1986. *Omanut hasiaĥ: Tikŝoret bejn-iŝit ufeulot dibur [Arto de la diskurso: Interpersona komunikado kaj parolaktoj]*. Tel Aviv: University Publishing Projects. [hebree]

Byram, M. 2012. Conceptualizing Intercultural (Communicative) Competence and Intercultural Citizenship. Jackson, J. (ed.). 2012. *The Routledge Handbook of Language and Intercultural Communication*. London: Routledge. 85-97.

Fasold, R. 1990. *Sociolinguistics of Language*. Cambridge: Blackwell. 1-38 (Address Forms).

Fiedler, S. 2002. On the Main Characteristics of Esperanto Communication. Knapp, K. & Meierkord, C. (eds.). *Lingua Franca Communication*. Frankfurt: Lang. 53-86.

Katriel, T. 1986. *Talking Straight: Dugri Speech in Israeli Sabra Culture*. Cambridge: Cambridge University Press.

Kecskes, I. 2012. Interculturality and Intercultural Pragmatics. Jackson, J. (ed.). 2012. *The Routledge Handbook of Language and Intercultural Communication*. London: Routledge. 67-84.

Matsumoto, D. & Hwang, H.-S. 2012. Nonverbal Communication: The Messages of Emotion, Action, Space, and Silence. Jackson, J. (ed.). 2012. *The Routledge Handbook of Language and Intercultural Communication*. London: Routledge. 130-163.

Nakane, I. 2012. Silence. Bratt Paulston, C. et al. (eds.). 2012. *The Handbook of Intercultural Discourse and Communication*. Chichester: Blackwell. 158-178.

Takeuchi, Y. 1995. *Nihonĝin no kodo bumpo [Socigramatiko de la japanoj]*. Tokyo: Toyo Keizai Shimbunsha. [japane]

Tannen, D. 2012. Turn-Taking and Intercultural Discourse and Communication. Bratt Paulston, C. et al. (eds.). 2012. *The Handbook of Intercultural Discourse and Communication*. Chichester: Blackwell. 135-157.

Wierzbicka, A. 2003[2]. *Cross-Cultural Pragmatics: The Semantics of Human Interaction*. Berlin: Mouton de Gruyter.

Woods, R. E. 1979. A Voluntary, Non-Ethnic and Non-Territorial Speech Community. Mackey, W. F. & Ornstein, J. (eds.). *Sociolinguistic Studies in Language Contact*. The Hague: Mouton. 433-450.